

<b>efik-o</b>	eficàcia, efecte	<i>eficacia</i>	<b>flank-o</b>	costat, banda	<i>lado</i>
<b>help-i</b>	ajudar	<i>ayudar</i>	<b>ali-a</b>	altre	<i>otro</i>
<b>rus-a</b>	rus	<i>ruso</i>	<b>komenc-i</b>	començar	<i>empezar</i>
<b>vetur-i</b>	anar en vehicle	<i>circular</i>	<b>blasfem-i</b>	blastomar	<i>blasfemar</i>
<b>kamp-o</b>	camp	<i>campo</i>	<b>saĝ-a</b>	assenyat, sabi	<i>sensato, sabio</i>
<b>renvers-i</b>	invertir, capgirar	<i>invertir, volcar</i>	<b>pet-i</b>	demanar	<i>pedir</i>
<b>ĉiu</b>	tot	<i>todo</i>	<b>sama</b>	mateix	<i>mismo</i>
<b>pen-i</b>	patir, esforçar-se	<i>penar</i>	<b>moment-o</b>	moment	<i>momento</i>
<b>van-a</b>	và, inútil	<i>vano</i>			
<b>fin-o</b>	final	<i>fin</i>	<b>tro</b>	massa	<i>demasiado</i>
<b>kri-i</b>	cridar	<i>gritar</i>	<b>kun</b>	amb	<i>con</i>
<b>kar-a</b>	benvolgut, estimat	<i>apreciado</i>	<b>sur</b>	damunt	<i>encima</i>
<b>sankt-a</b>	sant, sagrat	<i>santo</i>			
<b>kred-i</b>	creure	<i>creer</i>	<b>-iĝ-</b>	fer-se, esdevenir	<i>convertirse</i>
<b>preĝ-i</b>	pregar	<i>rezar</i>	<b>-ig-</b>	fer, convertir	<i>convertir</i>
<b>nov-a</b>	nou	<i>nuevo</i>	<b>-ad-</b>	continuat	<i>continuo</i>
<b>klopod-i</b>	intentar	<i>intentar</i>	<b>-ul-</b>	individu	<i>individuo</i>
<b>fort-o</b>	força	<i>fuerza</i>			
<b>streĉ-o</b>	esforç, tensió	<i>esfuerzo</i>	<b>mal-</b>	contrari	<i>contrario</i>

## TRO EFIKA HELPO

La veturilo de rusa kampulo renversiĝas. Ĉiuj penadoj de la kampulo restarigi ĝin estas vanaj. Fine li krias: "Vi karaj sanktuloj, helpu min!" Kaj, kredante je la efiko de sia preĝo, li denove klopodas per ĉiuj fortoj restarigi la veturilon. Per forta streĉado li renversas la veturilon sur la alian flankon. Nun li komencas blasfemi: "Vi malsaĝaj sanktuloj, ĉu mi petas vin, ke vi ĉiuj kune helpu min en la sama momento?"

## TRO EFIKA HELPO

La vetur-il-o de rus-a kamp-ul-o renvers-iĝ-is. Ĉiu-j pen-ad-o-j de la kamp-ul-o re-star-ig-i ĝi-n est-is van-a-j. Fin-e li kri-is: "Vi kar-a-j sankt-ul-o-j, help-u mi-n!" Kaj kred-ant-e je la efik-o de si-a preĝ-o, li de-nov-e klopod-is per ĉiu-j fort-oj re-star-ig-i la vetur-il-o-n. Per fort-a streĉ-ad-o li renvers-is la vetur-il-o-n sur la ali-a-n flank-o-n. Nun li komenc-is blasfem-i: "Vi mal-saĝ-a-j sankt-ul-o-j, ĉu mi pet-is vi-n, ke vi ĉiu-j kun-e help-u mi-n en la sam-a moment-o?"

## Bonvolu respondi tiujn demandojn

Kion volas restarigi la kampulo?

Kiaj estas liaj penadoj?

Ĉu la sanktuloj helpas lin?

Kian efikon havas la preĝo de la kampulo?

Kio okazas finfine?

\* \* \*

## Atentu!

Als ejercicios de "reomplir" poden haver (o no) espais en blanc (\_\_\_) que calgui deixar en blanc.

En los ejercicios de "rellenar" pueden haber (o no) lugares vacíos (\_\_\_) que deban permanecer vacíos.

<b>flav-a</b>	groc	<i>amarillo</i>	<b>manĝ-i</b>	menjar	<i>comer</i>
<b>plaĉ-i</b>	complaure, agradar	<i>gustar</i>	<b>ŝat-i</b>	apreciar, agradar	<i>gustar</i>
<b>sed</b>	però, sinó	<i>pero, sino</i>	<b>frukt-o</b>	fruit	<i>fruto</i>
<b>bezon-i</b>	necessitar	<i>necesitar</i>	<b>vitamin-o</b>	vitamina	<i>vitamina</i>
<b>kvankam</b>	malgrat que	<i>aunque</i>	<b>eble</b>	potser	<i>quizá</i>
<b>viand-o</b>	carn, tall	<i>carne (comida)</i>	<b>en-hav-i</b>	contenir	<i>contener</i>
<b>karn-o</b>	carn	<i>carne</i>	<b>bon-gust-a</b>	gustòs	<i>sabroso</i>
<b>kat-o</b>	gat	<i>gato</i>	<b>mus-o</b>	ratolí	<i>ratón</i>
<b>ĉas-i</b>	caçar	<i>cazar</i>			

## Kompletigu la vortojn (se bezone)

Roberto\_\_\_ manĝ\_\_\_ du flav\_\_\_ pom\_\_\_, sed tiu\_\_\_ ne plaĉ\_\_\_ li\_\_\_. Li\_\_\_ ŝat\_\_\_ viand\_\_\_, sed ne frukt\_\_\_.

Kvankam Robert\_\_\_ ne ŝat\_\_\_ la frukt\_\_\_, tiu\_\_\_ enhav\_\_\_ mult\_\_\_ vitamin\_\_\_ kaj la hom\_\_\_ bezon\_\_\_ ti\_\_\_.

La kat\_\_\_ ĉas\_\_\_ mus\_\_\_, sed ili\_\_\_ ne manĝ\_\_\_ ili\_\_\_, eble la mus\_\_\_ karn\_\_\_ ne est\_\_\_ bongust\_\_\_ viand\_\_\_.